

Okaze de la dekjara datreveno de la morto de Edmond Privat
Raporto pri lia porradia laboro
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 473, 1972.11.01 & 04

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Okaze de la dekjara datreveno de la morto de Edmond Privat kelkaj gazetoj en franclingva Svislando publikigis interesajn artikolojn pri la aktiveco de nia fama samideano. En la semajna gazeto *Coopération* ekzemple aperis artikolo de sinjoro Marc Reinhard, profesoro en la Universitato de Neuchâtel, pri la temo *Edmond Privat, fondinto de Radio-Genève*.

A.- Helpe de tiu bone dokumentita artikolo kaj de la libro *Aventuroj de pioniro* ni donos al vi kelkajn informojn pri la porradia laboro de Edmond Privat.

Cl.- La unuaj elsendaj provoj okazis kelkajn jarojn antaŭ la unua Mondmilito. Ekzemple en Svislando radio-ricevilo, kiu troviĝis en la Lernejo pri Horloĝ-industrio en la urbo La Chaux-de-Fonds, kapablis kaptadi la hor-indikojn, kiujn disaŭdigis la elsendejon Nauen.

A.- Ekde 1922 la aviadeja senfadena elsendejo de Cointrin apud Ĝenevo komencis disaŭdigi muzikon inter la meteorologiaj informoj, tio je la ĝojo de la radio-deĵorantoj kaj amatoroj.

Cl.- Ankaŭ en 1922 estis fondita en Lausanne radio-elsendejo. Edmond Privat kun alia ĝenevano Maurice Rambert provis starigi similan societon en Ĝenevo. Ili petis al la ĝenerala direkcio de la poŝtoj kaj telegrafado la permeson uzi la elsendejon de Cointrin por disaŭdigi bonan muzikon, klerigajn prelegojn kaj informojn pri la laboro de Ligo de Nacioj.

A.- Kiel Edmond Privat rakontas en *Aventuroj de pioniro*, la ŝipsignaloj, kiuj okupis la aeron, malebligis trankvilan aŭdodon. Necesis atingi ian internacian aranĝon pri tio.

Cl.- Kun la helpo de aliaj esperantistoj Edmond Privat kunvokis Eŭropan Konferencon en Ĝenevo. Ĝin prezidis inĝeniero Isbrucker, kiu poste fariĝis prezidanto de la Esperanta Akademio. La sola traduklingvo estis esperanto. La Konferenco bone sukcesis kaj el ĝi fondiĝis poste la nuna Interŝtata Unuiĝo kaj Mondoficejo de la Radiostacioj. Maurice Rambert sin plene dediĉis al la starigo de tiu Unuiĝo. Li bedaŭrinde rapide forgesis la servojn, kiujn alportis al li esperanto. Ofte estas tiel. Esperanto estas la lingvo de la malriĉuloj.

A.- Edmond Privat dediĉis la tutan vintron 1924-25 al la fondado de Radio-Ĝenevo. Li renkontis grandajn malfacilaĵojn por trovi kapitalon. La ĝenevaj bankistoj ne volis interesiĝi. Ili asertis, ke la tuta afero estas nur utopio, kiu neniam sukcesos.

Cl.- Tiam Edmond Privat sin turnis al la kooperativanoj kaj esperantistoj. Estas helpe de ilia mon-apogado, ke li povis starigi la 14-an de julio 1925 la kooperativan societon Radio-Ĝenevo. Tiu societo luis ĉambron en la subteretaĝo de la hotelo Métropole. Tiu ĉambro fariĝis la unua studio de Radio-Ĝenevo.

A.- La tasko de prezidanto de la administra konsilantaro de tiu nova societo ne estis tre ripoziga. Rapide la mikrofonoj ekpomenis ekster la studio por intervjuoj, por reaŭdigi diservojn kaj futbalajn maĉojn. Bezono je pli granda elsendejo rapide sentiĝis. La radio-oficistaro rapide kreskis. Ĝi postulis decajn labor-kondiĉojn.

Cl.- Radio-Ĝenevo translokiĝis al la placo de *Réformation*, kie ĝi luis du etaĝojn en granda domo.

A.- En 1928, do tri jarojn post la fondado de Radio-Ĝenevo, Edmond Privat forlasis Ĝenevon. Li unue translokiĝis en Veytaux apud Villeneuve, kie loĝis lia amiko Romain Rolland. Poste li instruis en Bellinzona en la itallingva kantono Tiĉino. Nur tiam Edmond Privat forlasis sian prezidan funkcion. Li restis membro de la Komitato de Radio-Ĝenevo. Tre ofte li kontribuis al la programoj de tiu elsendejo, kaj en 1943 li estis elektita honora prezidanto de Radio-Ĝenevo.

Cl.- Tiu titolo permesis al li gravan iniciaton. En 1947 li inaŭguris regulajn kronikojn en esperanto ĉe la Kurtonda Servo de Svisa Radio. Semajnon post semajno ĝis la somero 1962 li tiel diskonigis siajn plej intimajn pensojn profite al la esperantistaro, kaj ni scias, ke pluraj el niaj geaŭdantoj regule aŭskultadis tiujn enhavriĉajn radioprelegojn, kiuj rakontis pri la neperfortaj luktoj de Mahatma Gandhi, pri la interpopola konduto, pri la svisa kaj tutmonda federalismoj, pri la laboro de la fakaj organizaĵoj de Unuiĝintaj Nacioj, kaj tiel plu.

A.- La manuskriptoj de tiuj radio-prelegoj nun troviĝas en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. Jam du librojn ili naskis : *Aventuroj de pioniro*, kiu estas verko aŭtobiografia, kaj *Vivo de Gandhi*. Mi havis la okazon tajpi kaj korekti la tekstojn de ambaŭ libroj kun Henri Vatré. Tiu laboro permesis al ni diveni la labor-kondiĉojn, en kiuj tiuj tekstoj estis verkitaj. Tre rapida skribo pruvis, ke Edmond Privat tre ofte devis dediĉi siajn noktojn al tiu kromlaboro, kiun li efektivigis apud la poruniversitata laboro. Li tiam instruis en Neuchâtel.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !